



kaj **homo**
kosmo

3

74

Nia Tero, kiel planedo, estas nur ja eteta polvo en la senfina Kosmo. Al kiu, do, se ne al la astronomoj, estu pli sensenca la absurdo, ke sur nia planedeto ekzistas centoj de antagonismaj ŝtatoj kaj 3000 lingvoj!

(El la libro de la junaj astronomoj-esperantistoj
»Tragedio en la Universo«)

La KOVRILPAGO:

Nikola Matijević

HOMO kaj KOSMO

populara naturscienca Esperanto-revuo

La revuon eldonas **ASTRONOMIA OBSERVATORIO** de la Kroatia Naturscienca societo kunlabore kun

Kroatia Esperanto-ligo, Zagreb, Jugoslavio

La revuo »HOMO kaj KOSMO« aperas kvaronjare

LA ENHAVO DE ĈI NUMERO

Artikoloj:

- **Stelplena urbo en kiu ni vivas**
- **Ligo kun la tuta mondo**
- **Post Venuso »Mariner 10« vizitas Merkuron**
- **Islandanoj obeigis la vulkanon**

Rubrikoj: Vidindaĵoj en la ĉielo • Interesaĵoj kaj kuriozaĵoj • Novaĵoj • El la Esperanto-mondo • Premia konkurso
• El la redakcio

La revuon »HOMO kaj KOSMO« redaktas la redaktora komitato: **Demetrović Marko, Gjiĵoje Marinko, Vokoun Franjo**; ĉefa redaktoro **d-ro Gabro Divjanović**, direktoro de la Astronomia Observatorio; respondeca redaktoro prof. **Marija Divjanović**
Jarabono: vidu pri tio pli detale sur la lasta kovrilpaĝo.

Por Jugoslavio jarabono 20.— d.

Esperantistoj — natursciencistoj kaj naturamentoj — estas petataj kunlabori en nia revuo. La artikoloj ne estu fak-sciencaj, sed popularaj kaj nepre — interesaj! La manuskriptojn la redakcio ne resendas. Artikolojn kaj verkaĵojn sendu al la adreso: Astronomia observatorio, poŝtfako 38, 41103 Zagreb, Jugoslavio.



Jaro XII

Tria jarkvarono 1974.

N-ro 3.

POST LA FERIOJ

La someraj ferioj jam pasis. Ankaŭ ni esperantistoj rajtis tiam ne labori. Kaj tamen ni pasigis nian libertempon ne sole en sunbanado, migrado aŭ nenifaro, sed ankaŭ en laboro. Cetere ni utiligis niajn ripoztagojn por »fosi nian sulkon«. Ne ekzistas morta sezono por nia aktivado. Ĝuste en someraj monatoj okazis niaj plej gravaj manifestacioj — E-kongresoj, seminarioj, renkontiĝoj (unu en Hamburgo, aliaj en Bergamo, Münster kaj aliloke, du el la aranĝoj en aminda Primošteno) kaj ĉie partoprenis niaj raportantoj Marinko Ĝivoje, Emilija Lapenna, Franjo Vokoun, al kiuj ni en tiu ĉi numero de nia revuo disponigas spacon. Tial tiu ĉi numero estas pli tera ol kosma, pli esperantisteca ol observatorieca. Estas memkompreneble, ke en la centro de nia atento devis esti ĝuste tiuj gravaj aranĝoj.

Kaj tamen la leganto ĉiam trovos en nia revuo ion novan, interesan, kiel ekzemple la artikolo de norvega vickonsulo Jeljko Takaĉ, verkita aparte por nia revuo.

La revuo »HOMO kaj KOSMO« estas rekomendita de la **organo de U. E. A.** (»Konsulta Komisiono pri Lernejoj«) kiel tre taŭga legaĵo **en la lernejoj kie estas instruata Esperanto. Kursgvidantoj, vi povas havigi por viaj kursanoj pli grandan kvanton de unu sama numero kun granda rabato.** Utiligu la okazon!

STELPLENA URBO EN KIU NI VIVAS

(Gustav Kren, faka kunlaboranto de la Observatio)

*»Iam en estonteco la homo utiligos la terglobon
kiel bazon por starti kaj fondi regnon meze de
steloj...«*


((angla verkisto kaj pensulo H. G. Wells)

La homo ne estas ligita nur al la planedo sur kiu li ekestis. Ni estas atestantoj de miraklaj okazintaĵoj. La homo, tiu supera produkto de natura evolucio de organika materio, superis sin mem suprenleviĝinte el la surtera mondo en kiu li vivis dum jarcentoj — vojaĝante al la Kosmo kaj tiuokaze li la unuan fojon vidis kaj fotis sian denaskan planedon.

Nun ni certe scias, ke nia planedo estas ronda kaj blukolora. Iam, kiam la homo ne konsciis, ke la Tero estas ronda kaj kiam li ne povis eĉ imagi, ke ĝi ne estas alia ol ebena (ĉar kiamaniere, cetere, la homoj sur la alia flanko povus iri »surkape«), tamen li estis konscia pri ĉeesto de ĉielaj lumoj super sia kapo. Kvankam li ankoraŭ ne kapablis klarigi pri kio temas, tio ne ĝenis lin ke li esploru kaj memoru. Li tiel rimarkis iujn konstelaciojn al kiuj li donis fantaziajn nomojn kiel ekz. Aŭrigo, Leono, la Granda Ursino, Kankro k. s.

Al lia fantazio ne restis nerimarkita eĉ la stranga fenomeno dominanta sur la ĉielo dum noktoj sen lunlumo, similanta al subtila blanketa larĝa nebuleca strio disvastiĝanta de horizonto al horizonto. Jam en la malnova epoko al tiu fenomeno estis donita nomo la Lakta Vojo, kaj tiu konserviĝis ĝi nun.

Nuntempe al ni estas konate, ke la Lakta Vojo estas ekbrilo de miliardoj da steloj de nia galaksio kies lumoj pro grandega distanco kaj nekredbla multnombreco antaŭ niaj okuloj kunfandiĝis en tiun nebulecan kreaĵon. Kaj interstelaj distancoj? Ili estas tion grandaj, ke indas menci la metaforan komparon de konata angla astronomo Jeans: »Kiam ni en Eŭropon metus nur tri muŝetojn, Eŭropo estus pli loĝata de muŝetoj, ol la Kosmo de steloj.« Nia galaksio estas aro de pli ol 100 miliardoj da steloj, tio signifas da sunoj similaj al la nia. Kiel montras nia unua desegnaĵo, se estus al ni eble spekti nian galaksion el fora Kosmo, ni vidus ĝin kiel luman diskon kun diametro de ĉirkaŭ 80 ĝis 100 mil lumjaroj, dum la »dikeco« de centra parto estas iom malpli granda ol tridek mil lumjaroj. La Suno kiu por ni estas ĉiurilate



la plej grava, troviĝas ĉirkaŭ 30 mil lumjaroj de la centro, proksime al la rando de unu el la spiralaj brakoj, do apartenas al la kategorio de steloj »en antaŭurbo« de galaksio.

Guste pro tio ĉar la Suno ne estas stelo en la centro, nia galaksio ŝajne sur la ĉielvolbo montras diversan densecon. Se ni ĵetas rigardon al direkto de konstelacio Sagitario, ni vidas ke tie ĝi estas la plej densa, ni rimarkus, ke la plej proksimajn arbojn ni centro de nia galaksio.

Kiel tion klarigi en figura senco? Ni imagu, ke ni eniris tie maldensan arbaron. Se ni rigardus al la mezo de la arbaro, kie ĝi estas la plej densa, ni rimarkus, ke la plej proksimajn arbojn ni vidas unuope; tiuj pli malproksimaj estas ĉiam pli proksimaj unu al la alia, dum tiuj ĉe la ekstremo de nia vidpovo kunfandiĝos en verdaĵon. Se ni ĵetus rigardon al la kontraŭa flanko — al la rando de arbaro, ni konstatos, ke ni grandparte vidas unuopajn arbojn. Alivorte ni ĉiujn al ni proksimajn stelojn vidas unuope, kaj la aliaj, malproksimaj, kunfandiĝas en »luman zonon« ĉirkaŭ la ĉielo. Kaj proksimaj steloj formas sur la ĉielo la konatajn konstelaciojn, t. e. Skorpiono, Sagitario, Kapro ktp., kiuj kune sur la tuta ĉielo estas 88.

Per radio-astronomia metodo oni konstatis, ke la Lakta Vojo apartenas al kategorio de spiralaj galaksioj ĉe kiuj de centra


nukleo disiĝas spiralaĵoj. Jam la konata astronomo E. Hubble klasifikis la galaksiojn al elipsoformaj, spiralaĵoj kaj neregulformaj. Aparta kazo de elipsoformaj galaksioj estas kuglecaj galaksioj. La spiralaĵoj dividiĝas je simplaj (kiel nia) kaj »baritaj«, kie tra la centro disvastiĝas ia »trabo« de kiu disiĝas spiralaĵoj. Ĉe la neregulformaj galaksioj ne ekzistas difinita formo. La plej konata tiaspeca ekzemplo, videbla ĉe la suda ĉielo, estas la Malgranda kaj Granda Magelanaj nuboj, la akompanantoj de nia galaksio.

La konsisto de la Lakta Vojo

En la kosmo ĉiuj steloj ne estas egalaj. La astronomoj dividas ilin je diversaj tipoj laŭ ilia konsisto kaj ecoj. La klasifiko laŭ la koloro montras ankaŭ pri surfaca temperaturo de la steloj. Spektraj tipoj estas signitaj per literoj — nia Suno apartenas al spektra tipo »G« kun surfaca temperaturo de ĉ. 6000 gradoj celciaj. La energio de nia Suno estas entenata en termonukleaj procezoj, ĉe kiuj la hidrogeno transformiĝas en heliumon. Tiu procezo liberigas je unu gramo energion de 170 000 kilovatt-horoj. Ĉiusekunde la Suno perdas kvar milionojn da tunoj de sia maso, kio por miliardo da jaroj tamen faras nur 7 procentojn de la Suna maso.

Oni opinias, ke per transformiĝo de tuta hidrogeno en heliumon la stelo transiras en ruĝan giganton kun malpli granda surfaca temperaturo. Sed stelo povas fariĝi nestabila kaj inklina al erupciaj materi-elsputoj — la t. n. »novaj« steloj. Povas okazi, ke stelo eĉ eksplodas kaj tiamaniere fariĝas »supernova«. La blankaj nanoj estas malgrandaj, densaj steloj de kiuj unu kuba centimetro da maso pezus sur la Tero pli ol 300 tunojn. En pli nova tempo estas malkovritaj neutronaj steloj elsendantaj fortajn radioondojn.

La steloj, cetere, ne estas la sola »materio« en spirala konstruaĵo en kiu ni vivas. La tutan universon, kaj same nian galaksion, plenigas la t. n. »interstela materio.« Tiu materio estas plej ofte gaso kaj polvo, kaj ĝi povas esti malluma (malvarma) aŭ lumanta. Tiun materion varmigas la ĉirkaŭaj steloj. Nuboj de tia materio estas la t. n. difuzaj nebulozoj. La plej konata ekzemplo de tia nebulozo estas la nebulozo de Oriono Ĝi estas eĉ nudokule rimarkebla, kaj precipe belan formon montras jam en negranda (ĉasista) lorno. La lumo de tiu nebulozo atingas nin post pli ol unu mil jaroj, kio signifas, ke ĝi estas 9 600 bilionoj da kilome-



troj malproksime de ni. Ĝia diametro faras proksimume 15 lumjarojn, kaj la ĉefaj konsistigaj partoj estas hidrogeno kaj heliumo, el kiuj cetero konsistas ĉiuj tiaj kaj similaj kreaĵoj.

Kiel parto de nia galaksio ekzistas ankoraŭ planedaj nebulozoj, kugloformaj kaj malfermaj aroj. Planedaj nebulozoj estas nuboj de gasoj kaj korpuskloj kun centra stelo. Tiaj nebulozoj posedas altan surbazan temperaturon — eĉ ĝis 100 000 gradoj. Krom tio tre interesa estas la t.n. »Kрабо-nebulozo«, la unua optike identigita radiofonto en nia galaksio kaj la unua fonto de Rentgen-radiado, malkovrita ekster la Sunsistemo. Tiu nebulozo ekestis post eksplodo de la supernova el 1054 jaro, kaj oni konstatis, ke ĝi senĉese vastiĝas kun rapido de pli ol mil km en sekundo.

Malfermaj konstelacioj entenas kelkajn centojn da steloj. La plej konata ekzemplo estas Plejado, facile rekonebla en konstelacio de Taŭro. Tiu aro ne havas definitivan formon, diference de kuglecaj aroj, havantaj pli multnombrajn stelojn kaj ĉirkaŭantaj nian galaksion. Tipaj ekzemploj de tiaj aroj estas kuglecaj aroj aŭ stelaro M 13 en Herkulo aŭ aro Ha kaj Hi ĉe la limo inter la konstelacioj Perseo kaj Kasiopeo, rimarkeblaj ankaŭ per ĉasista lorno.

Al ni plej proksima spirala galaksio M 31 en Andromeda kun siaj du satelitoj estas malproksima pli ol du milionoj da lumjaroj kaj estas videbla nudokule kiel nebuleca nubeto. Ĝi kune kun nia kaj ankoraŭ dudeko da »pli proksimaj« galaksioj formas aron. La galaksioj kutime aperas arope.

Fine ankoraŭ unu praktika konsilo: ĉiuj kiuj pasigos sian libertempon for de urbaj lumoj, povas tre facile kun simpla (ĉasista) lorno kaj eĉ nudokule rigardi kaj konatiĝi kun multaj belajoj de la ĉielo, precipe en la regionoj de la Lakta Vojo.

NOVAĴOJ EL SCIENCO KAJ MONDO

Kio estas vero pri »flugantaj teleroj«

Nia leganto Z. R. el Poznan (Pollando) skribis al ni interalie la jenon: »En la 2-a ĉijara n-ro de via (nia) revuo vi aperigis la artikoleton »Atestaĵoj« pri »flugantaj teleroj« de M. G. sen redakcia postskribo en kiu ni devus trovi konkretan kaj kompetentan klarigon pri tiu ankoraŭ ĉiam enigma kaj mistera afero. La revuon, ja, eldonas Astronomia observatorio, en kiu laboras astronomoj de kiuj ni povus atendi ion pli konkretan kaj kompetentan, ĉu ne?«

Jen nia konciza respondo al la pola s-ano:

Unue, ni devas memori vin, ke multaj vortoj en tiu artikoleto kaj eĉ en la titolo mem estas enkadrigitaj per citiloj, kaj vi, ja komprenas kion tio signifas.

Due, ni intence aperigis la artikolon sen nia komentario, ĉar ni havas nenion por aldoni al nia artikolo kiu aperis en la n-ro 4/1971 de nia revuo ĝuste pri tiu temo. Verŝajne vi estas nova abonanto kaj ne legis tiun nian 10-paĝan artikolon en kiu ni esprimis nian klaran starpunkton. »Flugantaj teleroj« **povus** esti produkto de »kosmanoj«, de teranoj (ĉefstaboj de grandpotencoj) aŭ naturaj aferaĵoj. Ni astronomoj ne kredas, ke t. n. »flugantaj teleroj« estas heroldoj de prudentaj estaĵoj el la aliaj Kosmaj mondoj. Estas evidente, ke 99% da tiaj kaj similaj fenomenoj apartenas al naturaj, do, klarigeblaj fenomenoj, kiuj ankoraŭ ne estas klarigitaj. Kaj ni ripetas la lastan frazon de nia jam menciita artikolo: »Ni ne serĉu misterojn en la Kosmo, sed veron — sur ĉi tiu nia duonfreza planedo Terol!«

D-ro G. Divjanoviĉ

LIGO KUN LA TUTA MONDO

(Vidu la bildon sur la III kovrilpaĝo)

La plej eminentaj fakuloj asertas, ke evoluigo de sistemo de telekomunikado pere de satelitoj estas la plej granda atingaĵo de la homaro en utiligo de la Kosmo. En sistemo »Intersat«, organizita kiel internacia korporacio, estas membrigitaj ĝis nun 85 landoj.

Komence de junio estas lasita en trafikon satelita stacio apud urbeto Ivanjica en sudokcidenta Serbio (Jugoslavio): ĝi estas laŭvice la sepdeka en la mondo kaj deka en Eŭropo. Nun se iu el Jugoslavio parolas pertelefone kun ekzemple Ameriko aŭ Afriko, la voĉo de lia kunparolanto el alia kontinento aŭdiĝas tiel bone kvazaŭ li parolus el najbara ĉambro.

Artefarita satelito »Intersat IV F 2« ŝvebas »senmove« super Atlantiko je alto de 36.000 km. Giganta anteno apud Ivanjica, peza 260 tunoj, kies diametro estas 32 metroj, aŭtomate direktiĝas al la satelito sur kiu troviĝas 60 kanaloj por telegrafa kaj telefona komunikado kaj TV-programoj en servo de la stacio. La stacio en Ivanjica ne dependas de elektra energio troviĝanta en la elektra reto, ĉar ĝi posedas proprajn agregatojn por produktado de elektra energio. Ankaŭ la satelito ŝvebanta super la Tero estas duoble asekurita: apud ĝi troviĝas rezerva satelito, kaj sur la Tero estas la tria, preta alkosmiĝi en okazo de bezono.

Kiam sekvontjare en Beogrado estos malfermita ankaŭ internacia duonelektrona centralo, telefonaj abonantoj povos paroli kun transoceanaj kunparolantoj sen iaj perantoj, tutsimple vokante la telefonnumeron. La numero havos iom pli da ciferoj: ekz. por voki Novjorkon estos necese turni per disko 13 ciferojn.

M. G.

KOMUNA FLUGO DE »SOJUZ« KAJ »APOLLO« EN LA CENTRO DE LA ATENTO DE KONGRESO EN AMSTERDAMO

La 25. internacia astronautika kongreso en Amsterdamo okupiĝas ĉefe pri komuna flugo de soveta kosmoŝipo »Sojuz« kaj la amerika »Apollo«, okazonta sekvontjare. Kaj la amerikaj kaj la sovetaĵ kosmonaŭtoj subŝtrekis tie, ke la ĉefa problemoj estas — la lingvo. Pri teknikaj problemoj en la sekvaj numeroj de nia revuo.

POST VENUSO »MARINER 10« VIZITAS MERKURON

Post kiam pasintjare estis el Kabo Kenedi (Cape Kennedy) lanĉita »Mariner 10« komence de februaro, ĝi preterflugis super la maldiafanaj nuboj de mistera Venuso kaj daŭrigis sian flugon al la plej proksima planedo de Sunsistemo — Merkuro.

Dum sia preterflugo apud Venuso, Mariner faris kelkajn fotojn pri ĝia atmosfero, kiujn oni nun analizas en Esplora centro en Pasadena. Preskaŭ kvin monatojn post sia starto, »Mariner 10« atingis la plej malgrandan planedon de la Sunsistemo (29. III 1974). Espereble »Mariner 10« prizorgis multajn valorajn informojn kaj fotojn faritajn pere de du TV kameroj, sur kiuj devus esti rimarkeblaj detaloj eĉ pli malgrandaj ol cent metroj. Tiuj fotoj estos la unuaj pri la bolanta surfaco de Merkuro, faritaj el senpera proksimeco. Kune bun brulaĵo »Mariner 10« estas peza 503 kg.

Kvankam helpe de grandaj teleskopoj el la Tero estas rimarkeblaj mallumaj makuloj sur la disko de Merkuro, oni tamen ne povas kun certeco aserti kiel aspektas ĝia surfaco. Oni supozas, ke ĝi estas tre simila al la Luna, do, plena je krateroj, kun la diferenco, ke sur Merkuro povus ekzisti riveretoj, kaj eĉ riveroj kaj lagoj de fanditaj elementoj (ekz. plumbo) ĉar pro la granda proksimeco de Suno (inter 46 kaj 70 milionoj da km), la temperaturo sur lumigita flanko, kie la Suno troviĝas en zenito, estas 400 gradoj celsiaj. Sed oni kredas ankaŭ je tio, ke la temperaturo sur la malluma (nokta) flanko de Merkuro malaltiĝis ĝis la proksimo de absoluta nulo, resp. ĝis proksimume minus 260 gradoj, kaj ke tie estas glaciigita parto de Merkura atmosfero. Nome, regas opinio, ke Merkuro en praa pasinteco posedis gasan envolvajon sed ĝi, pro malgranda altira forto, »forfuĝis« en kosmon. La plej novaj esploroj montras, ke Merkuro tamen posedas atmosferon, sed ĝi estas proksimume trimiloble pli maldensa ol la Tera. Tian rezulton donis la antaŭnelongaj esploroj de la franca astronomo Dolfuss. (Iujn detalojn pri »Mariner 10« kaj pri karakterizaĵoj de Merkuro legu ankaŭ en la n-ro 3/1973 de nia revuo.

Gustav Kren

INTERESAĴOJ kaj KURIOZAĴOJ el la NATURO



Islandanoj obeigis la vulkanon

Por »Homo kaj Kosmo« aparte skribis **Željko Takač**, Zagreb
norvega vickonsulo

En Islando, oni diras, ekzistas ĉirkaŭ tricent vulkanoj, el kiuj, laŭ malnova »vulkana regulo«, dum 5 ĝis 10 jaroj devas ie okazi nova erupcio. Iuj erupcioj estis katastrofaj, sed ĉiuokaze la plej stranga estis la antaŭ nelonge okazinta, kiam la 23an de januaro 1972 vekiĝis la monto Helgafell sur la insulo Vestmansk.

Ĝi estas pentrinda insulo kiu kun fiŝista urbeto Heimaey (5500 loĝantoj) prezentas la plej gravan centron por fiŝkaptado kaj fiŝkonservado, la plej grava islanda ekonomia branĉo. Jarojnlonge mi studas la islandan kulturon, morojn kaj literaturon kaj mi tre ofte renkontis netajn spurojn kiujn la najbareco kun vulkanoj postlasis en la psiko de tiuj kvietanimaj norduloj. Tial estas facile kompreni, ke okaze de subita katastrofo sur la insulo regis perfekta disciplino kaj ke la tuta loĝantaro estis evakuita dum nuraj kvar horoj sen ununura viktimo.

Dum ĉe la piedo de Halgafell elfluis rivero de varmega lafo kaj la urbeton superŝutis la vulkana cindro — sur la insulo restis ekipo de 150 savantoj por rezisti. Unue oni savis pli valorajn objektojn, meblon, aŭtomobilojn k. s. kaj post tio oni transiris al »defendo«. Islandanoj la unuan fojon en la historio de la homaro sukcesis organizite rezisti. Unue oni malŝarĝis tegmentojn ke ili ne rompiĝu sub la premo de ĉiam kreskanta tavolo de varmega cindro. Post tio sur la pordoj kaj fenestroj de ĉiuj endanĝerigitaj domoj oni metis lamenplatojn kiuj malebligis al la cindro enpenetron en la internon de lignaj hejmoj.

Sed la sekva rimedo estis utiligo de akvoŝpruciloj (proksimume 20) direktitaj al fluanta lafo, kaj tiamaniere malvarmigante iom post iom unuopajn partojn (lafo estas varmega de 800 ĝis 1100 gradoj celsiaj) sukcesis »malrapidigi« ĝian moviĝon (15 m pohore), eĉ devojigi ĝin de ĝia mortiga atako



La loĝantoj de urbeto Hemaey forigas maron da cindro por povi eniri en siajn domojn

al la urbeto. Iom poste eliĝis ankoraŭ unu kratero, la t. n. Kir-kufjell kaj la tuta kataklismo daŭris kvar monatojn. Kiam la vulkano kvietiĝis elspuinte sur la urbon ĉirkaŭ 250 kubajn milionojn da lafo kaj cindro, persistaj Islandanoj komencis pensi pri sia reveno.

Nun sur la insulo denove loĝas ĉ. 3500 homoj, la lernejoj funkcias kaj en fabrikoj por fiŝkonservado oni normale laboras. Kvazaŭ ne-

nio estus okazinta. La loĝantoj de Heimaey eĉ komencis rekonstrui sian urbeton en kiu de 1500 domoj duono estis detruita.

Pri tiu ĉi unika batalo de Islandanoj kontraŭ vulkano estis farita senzacia kolorfilmo, kiun la artikolverkinto nur en Zagrebo prezentis 50-foje, kaj baldaŭ okazos prelego pri la sama temo en Esperanto kun filmprojekciado en najbara Hungario.

El la Esperanto-mondo



LA 59a - EBLE TURNOPUNKTO POR LA E-MOVADO

Aktiva neŭtraleco estas kaj restas la principo de UEA

Ankoraŭ unu nia kongreso, pri kies preparoj ni informis en antaŭaj numeroj de nia revuo, estas post ni. La E-kongresoj prave troviĝas en la centro de la atento de esperantistoj tutmondaj. La 59a U. K. de Esperanto pro streĉiteco kreita pere de iuj gazetartikoloj kaj cirkularaj leteroj, aperintaj antaŭ la Kongreso, estis ne sole streĉa sed ankaŭ ŝoka, preskaŭ senprecedenca okazintaĵo.

Al la 59a en Hamburgo kolektiĝis en moderna kongresejo inter 27. VII kaj 3. VIII pli ol 1600 kongresanoj el kvindeko da landoj. La Kongreso distingiĝis per konsiderinda nombro de salutmesaĝoj de en- kaj eksterlandaj aŭtoritatuloj: la kongresanojn bonvenigis interalie la Dua Urbestro de Hamburgo, prof. D-ro Biallas, kaj Ministeria Konsilisto D-ro Rommel, kiu transdonis la salutojn de Federacia Ministro pri Klerigo kaj Scienco Helmut Rohde, la Alta Protektanto de la Kongreso. Sekvis salutoj de oficialaj reprezentantoj el 18 landoj (la reprezentanto de la Ministerio pri Eksterlandaj aferoj de Israelo kaj la Ĝenerala Konsulo de Usono salutis esperantlingve) kaj sep pliaj registaroj sendis skribajn salutojn. Bondezirojn esprimis, same en Esperanto, s-ro Ernle Money, brita opozicia ministro pri kulturo kaj estro de la Grupo por Esperanto en la Brita Parlamento, D-ro Menabene (nome de la Socialista Internacio kaj Itala Socialdemokrata Partio), s-ro Berggreen por la Skolta Monda Oficejo kaj prof. V. Peevski, nome de Tutmonda Federacio de Sciencistoj. Pro tempo-manko la delegitoj de landaj E-organizaĵoj el 35 landoj povis esti nur prezentitaj al la kongresanoj.

La Solena Inaŭguro finiĝis per la festparolado de la prezidanto de UEA, prof. D-ro Ivo Lapenna. Post superrigardo pri la historio de la Universalaj Kongresoj, omaĝo al la kongresa lando

kaj prituŝo de la kongresa ĉetfemo »Naciismo kaj internacia kunlaboro en la nuntempa mondo« prof. Lapenna deklaris, ke li dum tiu ĉi kongreso eksiĝos el ĉiuj funkcioj en UEA kaj diris kelkajn adiaŭajn vortojn.

Pli ol 300 kongresanoj ĉeestis la Unuan ĝeneralan kunvenon de UEA, kiun unue salutis la reprezentantoj de entute 15 fakaj E-organizaĵoj kaj instancoj: Instituto Hodler 68, ILEL, TEJO, ISAE, IFEF, VEK, UMEA, ORE, Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj, Someraj Universitataj Kursoj, Skolta Esperanto-Ligo, Bahaa Esperanto-Ligo, Oomoto, Monda Turismo kaj Pola Radio. Sekvis diskuto pri la raporto de Estraro de UEA pri laborjaro 1973/74. Kiel daŭrigo de tiu ĉi kunveno estis laborkunsido pri la temo »Kion fari kontraŭ perdo de membroj?«. D-ro W. Bormann kaj poste J. Calado prezidis tiun ĉi kunvenon.

Proksimume 500 kongresanoj partoprenis la Duan ĝeneralan kunventon. Post la enkonduko de prof. Lapenna pri la kongresa ĉeftemo oni diskutis pri naciismo. Debato — jam tradicia programo de la UK-oj ĉi-jare traktis la demandon: Landaj revuoj ĉu utilaj? Enkondukis D-ro John C. Wells kaj partoprenis en la debato 14 kongresanoj (ĉeestis 200 personoj). Evidentiĝis, ke la opinioj pri la temo estis dividitaj en du tendencojn. Unu tendenco vidis en la landaj E-revuoj nepre utilan kaj nemalhaveblan valoron, sen kiu la landoj asocioj — la kerno de nia poresperanta agado — tute ne povus kontentige funkcii. Malgraŭ la problemoj financaj kaj organizaj tiuj revuoj devas daŭre aperadi. La alia tendenco atentigis al la granda elspezado de tempo, mono kaj forstrestreĉoj uzata por aperigadi tiujn revuojn, kaj volus pli racie kaj pli internacie labori, liverante al la membroj nur senpretektan bultenon por la administraj bezonoj de la landa asocio, sed plurnacian aŭ internacian revuon por plenumi la literaturan funkcion.

Internacia Somera Universitato en sia 27a sesio okazigis 11 prelegon. Jen la temoj kaj prelegantoj: Prof. D-ro Ivo Lapenna (Britio) prelegis pri »Bazaj juraj aspektoj de la eŭropaj organizaĵoj«, Prof. D-ro Sin'itirô Kawamura (Japanio) pri »Kiu nutras nin homojn sur la tero?«, Prof. D-ro Helmut Ebinger (Hamburgo) pri »Pli bona kompreno de aliaj landoj kaj popoloj pere de moderna geografia instruado«, Prof. D-ro ing. Oton Pancer (Jugoslavio) pri »La nuntempa agrikulturo kaj hortikulturo kaj ilia kontribuo al kreado de sana medio por la homaro«, D-ro Paul Neergaard (Danlando) pri »Urgaj taskoj de la scienco en la prok-

sima estonteco», Prof. Juan Régulo Perez (Hispanio) pri »Kanaria insularo kaj ĝia birdo, la kanario«, D-ro Mahomet Izmailoviĉ Isaev (Soveta Unio) pri »La rolo de sciencisto en evoluo de lingvo«, Prof. D-ro C. Stöp-Bowitz (Norvegio) pri »La didoj, birdoj ekstermitaj kaj pridiskutataj«, Prof. Gaston Waringhien (Francio) pri »La inkunabloj de Esperanto« kaj Prof. Vasil Peevski (Bulgario) pri »La scienco kaj la internacia lingvo«. La prelegonto D-ro Kazimierz Kordylewski (Pollando) estis malhelpita veni kaj lian manuskripton pri »La malkovro de polvaj terlunoj« legis A. Pettyn.

Same tiel menciindaj estas la festaj aranĝoj: spektakleca Germana vespero kaj Teatra vespero (BET sub gvido de Kiril Drajev prezentis »La Barbiro de Sevilla«, kies tradukon de la komedio de Beaumarchais redaktis Roger Bernard); la koncertkarakterata Internacia arta vespero, Interkona vespero, Internacia Balo, Junulara vespero, en kiuj preskaŭ ĉefrolis la muzika ensemblo »Kvarteto Esperanto« el Ĉeĥoslovakio. Same menciindaj estas ekskursoj, Junulara Konferenco kaj la 14a Internacia Infana Kongreseto (partoprenis 17 infanoj el 6 landoj). Pri la rezultoj de Oratora kaj Belarta konkursoj niaj legantoj havos okazon legi en »Esperanto« kaj »Heroldo de Esperanto«, same kiel la tekstojn de kongresaj rezolucioj.

La komitato de UEA (el 65 komitatanoj partoprenis la kunsidojn entute 59 — verŝajne rekorda proporcio!) elektis en Hamburgo novan estraron kaj novan prezidanton. **D-ro Humphrey Tonkin** estis de la komitato kun grandega plimulto de voĉoj elektita prezidanto de UEA. Li estas mem internacia kiel anglo loĝanta en Usono kie li laboras en universitata medio kiel vicprovosto pri subdiplomaj studoj kaj vicprofesoro pri anglaj lingvo kaj literaturo en la universitato de Pensilvanio. D-ro Tonkin, iam prezidanto, nun honora prezidanto de TEJO, estas 34 jara. Li transprenis respondecon ĉefe pri eksteraj rilatoj de UEA. La vicprezidanto D-ro **Carl Stöp-Bowitz** (Norvegio), profesoro en la universitato de Oslo, prezidanto de NEL kaj SUK, vicprezidanto de ISAA, akademiano, unu el la ĉefkunlaborintoj en PIV, transprenis respondecon pri faka agado; alia vicprezidento, D-ro **Werner Bormann** (Hamburgo), ekonomiisto, prezidanto de GEA kaj de la LKK de la 59a UK, kiu apartenis jam al la antaŭa estraro de UEA, respondecon ĉefe pri landa agado, landaj asocioj kaj similaj rimedoj.

La aliaj estraranoj estas: ĝen. sekr. **E. L. M. Wensing** (Nederlando), vicprez. de UEA de 1962—1972, respondeca pri diskonigo

de la agado de UEA interne de la movado, pri administrado kaj komerco kaj industrio; **D-ro Paul Denoël** (Lieĝo, Belgio), kuracisto, gvidanto de BEF, dediĉos siajn fortojn al reunuigo de la fortoj de UEA; **S. Swistak** (Pollando), prezid. de PEA, gajninto de pokalo »Lapenna« en Sofio 1963, respondecas pri turismo kaj ekstera informado, kunligon de informaj fakoj en diversaj landoj k. s. agadoj; **D-rino Flora Szabó-Felső** (Hungario), advokato, prezidantino de TEJO, la unua virino en la estraro de UEA (?), respondecas pri kongresoj kaj konferencoj; **E. W. Woessink** (Nederlando), impostoficisto, komitatano de UEA de 1959, estrarano pri financoj de 1960, respondeca denove pri financoj.

En ligo kun la ŝanĝoj en la Komitato kaj Estraro ekzistis el siaj diversaj funkcioj en UEA: la honora prez. H. W. Holmes, la ĝisnuna prez. kaj honorofica direktoro de CED prof. I. Lapenna, la honora membro M. H. Vermaas, komitatanoj prof. J. Régulo Pérez, J. Thierry, la antaŭa ĝen. sekr. de UEA G. Becker. Emilija Lapenna ekzistis el sia funkcio de sekretariino de la Belartaj Konkursoj. La prezidanto de la instruista asocio ILEI, rektoro H. Sonnabend, anocis, ke ILEI decidis nuligi sian aliĝon al UEA pro la fakto, ke ĝiaj kandidatoj ne estis elektitaj en la Komitaton.

Malgraŭ la grandaj renversoj okazintaj en la gvidaj organoj de la Asocio, la lastaj kunsidoj de la Komitato tamen evoluis en efike labora etoso, en kiu eblis klare elstarigi la ĉefajn taskojn nun solvendajn. Kiel vicigis ilin la nova prezidanto, ili estas tri: **resanigo de la financa situacio, reorganizo de la administrado kaj unuigo de la laborfortoj.** La ŝanĝojn oni devus ĉiuokaze konsideri kiel alfluon en nia movado de freŝaj laborfortoj.

Dum la ferma kunsido de la Kongreso la nova prezidanto dankis al la malnova Estraro, aparte al la ekzistinta prezidanto D-ro Lapenna kiel »giganta personeco kiu dum tridek jaroj per sia spirito kaj sia kuraĝo trenis la E-movadon al pliaj altoj« kaj kies meritojn skizi en kelkaj vortoj li nomis neebla.

Estas decidite, ke la sekvonta, la 60a UK de Esperanto, okazu en Kopenhago inter 26-a de julio kaj 2-a de aŭgusto 1975. Ĉiuj germanaj radiostacioj dissendis raportojn pri la Kongreso, la tuta gazetaro de FRG raportis pri ĝi, Televido elsendis kelkfoje informojn. La librostando de la Kongreso bone funkciis dank'al la klopodoj de s-ro Pickel, kiu krome sukcesis eldoni ankaŭ du bultenojn de PILOPRESS.

Marinko Ĝivoje

LA 47a SAT-KONGRESO EN BERGAMO

Pri la 47a SAT-kongreso, okazinta de la 3a ĝis la 9a de aŭgusto en itala urbo Bergamo, la disponebla spaco permesas treege koncizan raporton (detalan raporton la interesatoj povos trovi en »Sennaciulo« kiu la 1-an de oktobro cetere fariĝos 50-jara!). Bergama E-grupo »Johano la 23a«, sub gvido de kav. Federiko Gialanzé, Mirko Marcetta k. a., sukcesis organizi agrablajn kunestadon dank'al la helpo de la politikaj kaj turismaj aŭtoritatoj. Eur College San Marco kun siaj klimatizitaj ĉambroj montriĝis treege taŭga kongresejo-hotelo. Neforgesebla restos en memoro de ĉirkaŭ 300 partoprenintoj el 21 landoj la solena malfermo, folkloraj prezentado de trupo »Gli Zanni« kaj ĥoro »Idica«. Estis prezentita ankaŭ la dramo »Doktoro Rosales« de G. Silfer kaj kelkaj eroj de diversaj aŭtoroj de Drama grupo de SEK el Zagreb. Okazis kelkaj prelegoj (E. Borsboon pri la vivo de Lanti, M. Ĝivoje pri fungoj, M. Marcetta pri nova geografio kaj nova skribo) kaj kelkaj ekskursoj .

Ĉar en la kongreslando okazis komence de la Kongreso la abomena atenco de faŝistoj, la Kongreso en sia gvidrezolucio esprimis ankaŭ sian indignon al la aŭtoritatoj per protesto. Dum la Kongreso okazis utilaj kontaktoj kun la lokaj sindikatoj pri kiuj raportis la lokaj ĵurnaloj. La sekvonta SAT-kongreso okazos en Hago, samtempe kun UEA-kongreso.

La 30-a JUNURALA KONFERENCO

La 30a internacia junulara konferenco en Münster okazis de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto. Partoprenis ĝin ĉ. 300 esperantistoj el 30 landoj. La inaŭguron ĉeestis ankaŭ la prezidanto le UEA, D-ro Tonkin. Aparta travivaĵo estis la kulturarta vespero. La konferenca libreto enhavas ankaŭ la salutvortojn de D-rino Katharina Focke, federacia ministro pri junularo, familio kaj saneco en kiu estas rimarkinda jena frazo: »Sendube Esperanto havas gravan funkcion en la internacia junulara kaj kultura interŝanĝo, kiun la federacia registaro rigardas kiel signifan eron de sia porpaca politiko.«



Novajoj el Jugoslavio

UNUA TENDARA LERNEJO EN PRIMOŠTENO

La planita okazigo de la renkontiĝo de gelernantoj el kvin landoj, kie estis instruata Esperanto, sur la Sepa Kontinento, devis ŝanĝiĝi kaj la VIII-a Kunordiga konferenco okazinta en Maribor la 13—14 IV konkludis okazigi la renkontiĝon en Primošteno. Estas ja konate, ke en Primošteno ekzistas esperantista kampadejo, kie oni havas la kondiĉojn por okazigi diversajn aranĝojn.

La Unua Internacia Tendara Lernejo okazis de la 25-a de junio ĝis la 3-a de julio 1974 sub la aŭspicio de UNESCO-Komisiono por Jugoslavio. Kun bedaŭro ni devas konstati, ke la renkontiĝo ne estis kompleta pro la nepartopreno de gelernantoj el Aŭstrio kaj Bulgario. Neniu insistis ekscii la veran kaŭzon de ilia foresto, sed tamen oni aŭdis diversajn komentariojn, iuj eĉ atentigis pri la nepra forigo de antagonismo, kiu estas kelkloke sentata. Ni devas koscii pri la fakto, ke ekzistas universalaj leĝoj kiujn oni ne povas refuti kaj oni devas al juna generacio klare prezenti la hodiaŭan realecon.

En Primošteno tamen troviĝis 85 gelernantoj el tri landoj kaj disdividitaj en kvar klasoj, kompreneble intermiksitaĵoj el italoj, hungaroj kaj jugoslavoĵoj, sidis en la lernejaj benkoj, aŭskultis kaj aktive partoprenis en lerneja programo. Krom geografio, muziko, poezio, prozo, sporto kaj ceteraj lernejaj programeroj, estis ankaŭ soci-politikaj temoj, kiujn oni prezentis al gelernantoj en la formo por ili komprenebla, kaj temoj por ili percepteblaj.

La liberaj aktivecoj de gelernantoj pruvis per ilia efektivigo de pluraj konkretaj agoj ilian ĝustan signifon. Ni devas menciigi, ke estis granda ĝuo observi diversajn komunajn aktivecojn de gelernantoj. Regula matena gimnastiko, post la lernejaj horoj, piedpilkado, desegnado, verkado de informoj, artikoleto, prozaĵoj ktp, aktiva kunlaboro en la ĉiutaga bulteno de ITL-i, ktp. Ne mankis aranĝoj de gelernantoj, pri kiuj ni devas esprimi nian laŭdon. Vendreda kaj sabata vesperoj estis dediĉitaj al kulturartaj

prezentadoj. Skeĉoj, deklamado, rondodancoj, kantado kaj aliaj eroj el la programo provokis merititajn aplaŭdojn. En la programo de ITL-o estis ankaŭ vizitoj kaj ekskursoj.

Ni menci la prezentadon de la filmo pri la Sepa Kontinento en la kinejo en Šibenik kaj vesperan viziton al unu infanprezentado en kadro de la XIV-a jugoslavia festivalo de infanoj en Šibenik.

Ekskurso al majestaj akvofaloj de Krka, certe restos neforgesebla ne nur al gelernantoj sed ankaŭ al plenkreskuloj, ĉar tiajn naturajn fenomenojn oni ne renkontas ĉiuloke.



Matena gimnastiko sur la bordo de Primošteno

(Fotis: Franjo Vokoun)

Ni ne povas eviti mencii ankaŭ iom ne tro favoran veteron, kiu kaŭzis la nekompletan kontenton. Nome, dum la merkreda nokto estis tia ventego, ke estis timo, ke la tendoj ne eltenos. Sed, feliĉe krom ioma nedormo, aliaj malagrablajoj ne okazis. La sabata ventego kaj pluvo estis tamen pli malagrablaj, ĉar krom kaŭzita neeblo dormi sub la tendoj, ekestis kelkaj problemoj.

Dimanĉo, malgraŭ sunbrila mateno, provokis embarason ĉu okazigi planitan ekskurson al la Sepa Kontinento? Tamen, post ioma atendo kaj interkonsiliĝo kun la ŝipestro, la decido estis: jes, ni veturu al la sopirata »kontinento«. Elirante el la primoštena haveno, ŝipeto »Vranjak« komencis la lukton kun la ondoj

kiuj estis sufiĉe fortaj kaj altaj. Regis ioma necerteco precipe kiam la ondoj superŝutis la ŝipan ferdekon, sed feliĉe tio ne daŭris longe, ĉar ju pli ni malproksimiĝis de Primošteno, la vetero estiĝis pli bela kaj agrabla. Albordiĝo en la haveno de la Insulo de Juneco forigis malbonhumoron kaj melankolion, ĉar la bonveno de skoltoj per ilia hura, hura, zdravo zdravo kaj ceteraj sloĝanoj, kreis etoson kiun oni povas ĝisvivi nur inter la junularo.

La komandanto de laborbrigadoj, ĝenerala sekretario de la Asocio de skoltoj por SR Kroatio (Savez izviđača Hrvatske), k-do Slavko Bjajiĉ, post la saluto kaj kelkaj bonvenaj vortoj donis detalajn informojn pri la signifo de la konstruo de la Insulo de Juneco, kiu fariĝis la Centro por infana kaj junulara tendumado. Ili regalas nin ĉiujn per teo, sandviĉoj kaj keksoj. Al la reprezentantoj de unuopaj grupoj estis transdonitaj insignoj kaj flagetoj, kaj al ĉiuj ĉeestintoj iliaj emblemoj. Inter gelernantoj kaj skoltoj estis interŝanĝitaj donacetoj, inter kiuj flanke de skoltoj estis eĉ iliaj pajlaj ĉapoj kun multaj surskriboj. La adiaŭo kun skoltoj estis kortuŝa, ĉar la renkontiĝo kaj kamaradeca konduto sentiĝis dum la malmulta restado inter ili.

Ne estis eble haltigi geknabojn elsaltadi el ankoraŭ ne labordiĝinta ŝipeto en la havenon de la Sepa Kontinento. Scivolemo, ekscito, kiu la unua konkeros la »kontinenton«, estis la momentoj de kulmino de ĝojo, ĉar efektiviĝas la longe sopirata celo.

Sur la arbobranĉoj oni metis esperantajn flagetojn, kiel memoron, ke esperantistoj estis sur la insulo Kakan, kiu estas donacita de la komunumo Ŝibenik por krei »kontinenton« por infanoj de la tuta mondo. Ekestis aparta etoso, kiam gelernantoj el Petrinja deklamis kelkajn strofojn de Recitalo pri la Sepa Kontinento kaj kiam ĉiuj kune kantis la kanton pri Sepa Kontinento. Momento neforgesebla, sed samtempe iom zorgiga, ĉar estis seniluziigoj pro nenia efektiviĝo de la vizio el la filmo. La mesaĝo de infanoj estas: »Efektivigu jam de longe promesitan por ni liberan respublikon.« Ni promesas nian helpon, ni propagandos ni kolektos materiajn rimedojn, ĉar ni propraokule vidis la staton.

Ni ne rajtas ne mencii la kontribuon de plenkreskuloj en la efektiviĝo de la Internacia Tendara Lernejo. Oni devis organizi, zorgi, prepari ktp. Ĉar tio okazis en Jugoslavio estis elektita organiza komitato, lerneja gvidantaro k. c. Kiel prezidanto de Jugoslavia organiza komitato funkciis d-ro Peter Zlatnar (Ljubljana), sekretario Janez Zadavec (Maribor), komitatanoj mg. Aleksa Hrstiĉ (Split), Rade Petkoviĉ (Ŝibenik) kaj Franjo Vokoun (Za-



La gvidantaro kaj la geinstruistoj de Internacia Tendara Lernejo
(Fotis: Franjo Vokoun)

greb). Direktorino de la lernejo estis prof. Anja Hurčak (Rijeka). La instruistinoj: Elizabeta Formaggio (Italio), Sonja Tavčar, SR Slovenio (Jugoslavio), Dragica Grabnar, SR Slovenio (Jugoslavio), Erzsebet Bodnar (Hungario), Marija Horjinek SR Kroatio (Jugoslavio), instruistoj: Nikolao Lasalandra (Italio), Šandor Pal (Hungario), Milan Jankovič SR Serbio (Jugoslavio), Ante Vesanovič SR Kroatio (Jugoslavio) ktp.

Krom la instruistoj estis ankaŭ kelkaj prelegantoj inter ili: Marta Berdnik (SR Slovenio, Jugoslavio), Johano Ingusz (Hungario), Zlatko Tišljar (Jugoslavio) k. c. Estis ankaŭ klasestroj kaj iliaj helpantoj: Marija Srebrnič (SR Slovenio), Emeriko Marčeta (Italio), Bosiljka Martinčević (SR Kroatio). Ne eblas mencii ĉiun personon kiu partoprenis aŭ kontribuis iamaniere ĉe la efektivigo de la Unua Internacia Tendara Lernejo, sed kompreneble ĉiuj meritas dankon. Nepre ni devas alte taksi la ĉeeston de oficialaj reprezentantoj, kies prijuĝo de la rezultoj de nia ITL-o povas havi gravan kontribuon por nia estonta porlerneja agado. Kiel

oficiala observanto de Sekretariato por kulturo, respektive de la Instituto por progresigo de elementa klerigado en SR Kroatio, estis prof. Mladen Dolenc el Zagreb. D-ro Helmar Frank estis oficiala reprezentanto de Unuiĝo de instruistoj de FR Germanujo. Kiel observantoj estis: Marin Bacev de Bulgara Esperanto Asocio kaj Johano Ingusz, vicprezidanto de ILEI.

Ni devas noti ankoraŭ kelkajn okazaĵojn dum la daŭro de ITL-o. La reprezentantoj de unuopaj grupoj estis akceptitaj ĉe la prezidanto de la komunumo Šibenik, kiu salutis la partoprenantojn ne nur je la nomo de la komunumo, sed ankaŭ je la nomo de la organizantoj de la XIV-a jugoslavia festivalo de infanoj kaj je la nomo de la komitato de la Sepa Kontinento.

De Radio Saarajevo estis raportistino, kiu dum kelktaga ĉeesto surbendigis materialon por ses elsendoj. Same ĉeestis ĵurnalistoj de hungara komunistaj junuraj gazetoj el Budapeŝto.

Ni adiaŭis de ITL-o, sed surbaze de la spertoj oni devas bone studi la rezultatojn kaj esplori la metodojn kiuj en la estonto estus eventuale pli efikaj kaj pli kuraĝigaj.

Franjo Vokoun

Observanto de Kroatia Esperanto-Ligo

KAMPADEJA SEMINARIO

Denove, la dekkvaran fojon, Kroatia Esperanto-Ligo el Zagreb organizis en julio seminarion por esperantistoj pedagogoj en Primošteno. Antaŭ komenciĝo de la Seminario en la sama kampadejo kun tendoj tute kovritaj per pinarbaj branĉoj okazis la unua internacia Tendara lernejo, por kiu estis rezervita preskaŭ la tuta disponebla tendara spaco. Kiam la infanoj de najbaraj landoj, eksperimente lernintaj Esperanton dum almenaŭ 3 jaroj, forlasis la tendojn, venis pli aĝaj esperantistoj kaj pedagogoj kaj okupis la lokojn en la tendoj kaj en la plaĉa kampadeja restoracio.

Por seminarianoj la lokoj estis rezervitaj, sed ĉijare pro aparte granda invado de turistoj, volontaj ferii en eksterhotela spaco, la malfacilaĵoj rilate akcepton de esperantistoj neanontintaj sian alvenon, ekzistis en pli malagrabra formo ol kutime. Nome, pro la konata tutmonda inflacio kaj ĝia sekvo granda prezosalto por ĉiuj aĵoj kaj ĉiuj servoj, ankaŭ hotel-prezoj por multaj estis tro altaj, precipe por familioj kaj pro tio lokoj en kampadejoj estis tre serĉataj. Tamen, seminarianoj havis je dispono

cion necesan, ankaŭ la klasĉambrojn en la loka elementa lernejo. La seminario por esperantistoj pedagogoj entenis denove 3 kursojn: por komencantoj (ĉifoje tiuj estis nur pedagogoj), por progresintoj kaj por esperantistoj posedantaj diplomon pri la du unuagradaĵaj kursoj, kiuj en la kurso C sekvas lecionojn kapabligantajn ilin por instruado de Esperanto.

Ĉijare la plej malmultaj estis en la triagrada kurso. Pro mabundaj financaj eblecoj, Kroatia Esperanto-Ligo devis limigi la nombron de partoprenantoj al 20 kaj ĉijare ĝuste tiom da seminarianoj vizitis la tri kursojn. Post la finitaj prelegoj, kiuj ĉijare daŭris 15 tagojn, la seminarianoj faris ekzamenon. Kvankam la prelegoj okazis nur antaŭtagmeze, (sed oni ja devas scii, ke ekzistis tagoj dum la seminaria tempo, kiam antaŭtagmeza varmeco en Primošteno atingis pli ol 30 gradojn C) sidi 5 horojn en la fermita ĉambro, aŭskulti multajn prelegojn, esti devigata mem sufiĉe lerni, dum aliaj en la loko banas sin, estas iaspeca ofero, kiun seminarianoj ankaŭ ĉijare, kiel en la pasintaj dekkvar, volonte akceptis kaj kronis per sukceso: ĉiuj faris la ekzamenon.

Seminario por esperantistoj pedagogoj de Kroatia Esperanto-Ligo ne estas lingvo-perfektiga kurso. Jes, la plej grava objekto en ĝia instruprogramejo estas lingvo kaj gramatiko, sed ankaŭ komencantoj en la seminaria A-kurso, kie prelegoj okazis en la nacia lingvo, aŭskultis prezenton pri la esperantaj literaturo, historio kaj organizo, kompreneble nur en plej konciza formo, sed kursanoj el B kaj C-kursoj devas scii multajn detalojn, kiuj konsistas el centoj da nomoj, jaroj kaj titoloj. Kiel ĉiam feriintaj esperantistoj en Primošteno povis viziti unuopajn prelegojn laŭ propra elekto. Por eksterlandanoj interesaj estas nur Bkaj C-kursoj, kie ĉiuj prelegoj estas nur en Esperanto. La juna Japano en finaj seminariaj tagoj apartenis al tre fervora vizitanto de prelegoj. Germana esperantisto Reinhard Haupenthal, kiu kun la familio feris en Primošteno, havis intereson por prelegoj pri literaturo, ĉar li mem parte realigis parte planas organizi seminariojn por perfektigo de esperanta scio. Li ankaŭ por seminarianoj kaj feriantaj esperantistoj faris vesperan prelegon.

Prelegoj estis organizitaj preskaŭ ĉiuvespere, aŭ por esperantistoj aŭ propagandcele por neesperantista publiko. Dum la seminaria tempo en la primoštena kampadejo feris grupo de zagrebaj infanoj, kiuj por esperantistoj preparis mallongan programon kaj rekompence la ĉijara direktorino de la Seminario Anjo Hurĉak faris por la infanoj tre bonan informan prelegon pri Esperanto kun lumbildoj eldonitaj de la movado Frené. Inter la

vesperaj prelegantoj estis la fidela amiko de Primošteno Hugo Kraus el Vieno, kiu prelegis pri siaj vojaĝoj tra Pollando, ilustrinte la vortojn per belegaj memfaritaj kolorbildoj. Ankaŭ Prof. O. Pancer unu vesperon plenigis per rakontoj pri siaj travivaĵoj. Per tre sukcesinta adiaŭa festo finiĝis la ĉijara seminarro por esperantistoj pedagogoj.

Emilija Lapenna

(Elsendo de Radio Zagreb 2. VIII 1974.)

Post la plenkunsido de JEL en Beogrado

Post 4 senkongresaj jaroj sekvontjare landa E-kongreso en Ĉakovec

En Beogrado okazis la 2an de junio la plenkunsido de Jugoslavia Esperanto Ligo pri kiu ni volas raporti pli detale, ĉar pro neaperado de Liga organo kiu, ja, informos pri tio la jugoslaviajn esperantistojn?

Post la referato kiun prezentis la prezidanto prof. d-ro Boja Popoviĉ, sekvis diskuto, en kiu plej rimarkitaj estis la vortoj de d-ro Peter Zlatnar kaj Franjo Vokoun laŭ ĝenerala opinio. P. Zlatnar pritraktis, inter alie, praktikan aplikon de Esperanto en la lernejoj kaj estis tre interese aŭdi de tiu nia ĉefa batalanto sur tiu kampo, ke ekz. en SR Slovenio ankaŭ nun, du jarojn post la konata enketado de lernejoj kaj komunumoj, daŭre kreskas la intereso por enkonduko de Esperanto, principe ŝe organizaĵoj kiuj tiam montris pli ol 80-pocentan aprobon. Li pluen substrekis, ke ĉe la konferencoj pri minoritataj interlingvaj problemoj (kia antaŭ nelonge okazis en Ohrid kaj baldaŭ okazos en Triesto kaj aŭtune en Parizo), kiuj pritraktas la problemojn surbaze de egalrajto en interpopola komunikado, devas prezentiĝi ankaŭ esperantistoj, kaj ĉiu el ni povas kaj devas laŭ siaj eblecoj kontribui al tiu ĉefa poresperanta celo pere de la Socialista Unuiĝo.

La tagordo antaŭvidis pritrakton de jenaj demandoj: la nomo de la organizaĵo, proponon pri statutŝanĝo, provizoran elekton laŭ la nova statuto, komunajn taskojn kaj ilian financadon. La E-nomo de la organizaĵo restis neŝanĝita — Jugoslavia Esperanto Ligo, nur la nacilingva nomo estas ŝanĝita: Jugoslavenski savez za esperanto.

Ne estis starigitaj iaj komunaj taskoj. La nuna komitato devigis sin ordigi la aferon rilate la aprobon de la nova statuto,

tial oni ankaŭ ne ŝanĝis la ĝeneralan sekretariinon, sed ŝi ricevis nur helpanton, kaj aŭtune kiam estos aprobita la statuto, oni ordigos la aliajn aferojn.

Komitatanoj A, proponitaj de KEL (I. Rotkvič), estis elektitaj: d-ro P. Zlatnar kaj prof. d-ro inĝ. Oton Pancer. Pri revivigo de La Suda Stelo estis nenio priparolita; ĝi, do, dormos ankaŭ pluen! Pri la landa E-kongreso estis akceptita propono de E-societo en Ĉakovec, kiu jam antaŭ la okazigo de la 19-a landa E-kongreso en Niš en 1970, esprimis pretecon organizo la Kongreson. Sed KEL devos zorgi pri abunda helpo, kaj la societo en Ĉakovec devos sendube serĉi helpon ankaŭ de esperantistoj el najbara urbo Varaŝdin, ke la 20-a estu pli impona ol estis la 19-a. Kompreneble, ke la organizantoj, kiam ili decidis pri la dato kaj programo de la Kongreso povos kalkuli ankaŭ pri helpo de nia monata bulteno kaj de aliaj E-bultenoj (revuoj) aperantaj en nia lando (»Homo kaj Kosmo«, »Juna Ambasadoro«, »Jugoslavia Fervojoisto«, »Jes, sed«).

Dum la plenkunsido oni povis aŭdi unuflanke pri stagnado (ekz. de MEL en Skopje kaj oni esprimis aprobon al la klopodoj de E-societo el Prilep por renovigo de tiea Ligo kun sidejo en Prilep) sed aliflanke pri laŭdindaj aktivecoj en pluraj societoj. Ni aŭdis ankaŭ pri nefarita bilanco pro manko de konvena homo en la sidejo de JEL por plenumo de tiu tasko.

La nuna ĝenerala tendenco en nia lando estas decentraligo de kultura kaj eduka sistemo, kaj tio devus esti ankaŭ tendenco en nia movado. Ni havos okazon konstati ĉu niaj E-ligoj pli memstarigos en baldaŭa estonto aŭ la stato restos proksimume la sama.

OBSERVANTO

Represita el monata informa bulteno »Voĉo« n-ro 6/74.

SEMINARIO POR E-GVIDANTOJ EN MARIBOR

La 11-an de majo okazis en Maribor seminario por junularaj E-gvidantoj, al kiu partoprenis esperantistoj el Bjelovar, Ĉakovec, Ljubljana, Maribor, Ormož, Varaŝdin, Vinkovci kaj Zagreb. La 12-an okazis kunveno de reprezentantoj de E-societoj el Kroatio kiun organizis Kroatia Esperantista Junerala Asocio. Oni decidis, ke Internacia renkontiĝo de junpioniroj-esperantistoj okazu la 13-an de oktobro en Petrinja, kaj Festivalo de kulturartaj grupoj de E-junuralo la 23-an de novembro en Bjelovar.

Dum la VIII Kongreso de la Junulara Asocio de Kroatio oni diskutis ankaŭ pri Esperanto

Inter la 26-a kaj 28-a de junio okazis en Zagreb la VIII Kongreso de la Junulara Asocio de Kroatio, kiun partoprenis 633 reprezentantoj de 543.000 gejunuloj el SR Kroatio. La Kongreso okazis en antaŭ nelonge finkonstruita moderna koncertejo »Vatroslav Lisinski«. La kongreso laboris en kvar komisionoj kaj finiĝis kun plenkunsido.

Inter dudeko da delegitoj kiuj partoprenis en la diskuto en la komisiono por socia aktiveco de gejununol estis unu esperantistino: Slavica Lovrin, teknika redaktoro de »Juna Ambasadoro« el Bjelovar. Interalie ŝi substrekis la bezonon ke la Junulara Asocio organizigu tiel, ke ĝi povu iniciati batalon por enkonduko de Esperanto en ĉiuj niaj lernejoj. Tiamaniere Esperanto vere fariĝus la universala lingvo, kio sendube kontribuus al pli bona interkompreniĝo inter la junularo de la mondo.

Dek kvin jaroj de ĉiumonataj resumoj en tramista gazeto

Ĉijare pasis 15 jaroj de aperado de entreprena gazeto ZET (Zagreba Elektra Tramo), kiun komence redaktis s-ano Zvonko Rehorić kaj post la jaro 1962 faka ĵurnalisto Mario Bazina. La gazeto estis tiel bone redaktata ke ĝi estis kelkfoje premiita kiel plej bona urba fabrika gazeto. La tutan tempon ĝi havis konstantan rubrikon »Esperanto« (duonpaĝo) kun resume de ĉiuj pli gravaj artikoloj, kaj poste ankaŭ la nacilingvan »Širom svijeta« (Tra la mondo) en kiu aperas elesperantigitaj novaĵoj el la urba trafiko tra la mondo (plej fidela kunlaboranto estis H. D. Palmer el Bristol). Kia estos la plua sorto de la rubriko dependas ankaŭ de kunlaborantoj, kiuj sendu novaĵojn al la redaktoro de la rubriko: Zvonko Rehorić, Radnički dol 52/III, YU-41000 ZAGREB, Jugoslavio. La redaktoro kaj la eldonisto akceptu nian gratulon!

Astronomoj en Pula finis E-kurson

Fine de junio en Pula okazis solena kursfinfesto en la astronomia societo »Istra«. Dek kvin kursanoj el 25 kiuj enskribiĝis finis la E-kurson kaj ricevis atestilojn. La klubanoj starigis kolektivan korespondadon kun la E-klubo en Novosibirsk (Sovetio).

Fine de septembro okazos daŭriga kurso, kiun gvidos D-ro Ivo Borovečki laŭ la lernolibro de D-ro I. Szerdahelyi. Unu grupo partoprenis la Kongreson de hungaraj astronomoj amatoroj en Ozd (apud Budapeŝto) en la dua duono de julio (pri tio legu raporton en sekvonta numero de nia revuo).

KVINMAJA PREMIO AL E-SOCIETO BJELOVAR

Dum la solena kunsido de Komunumo Bjelovar, okazinta la 6-an de majo okaze de 29-a datreveno de liberigo de urbo Bjelovar, estis disdonitaj 5-majaj premioj al meritaj urbanoj, socipolitikaj organizaĵoj, societoj kaj institucioj. La E-societo Bjelovar ricevis skriban rekonon kaj monpremion de 2000 dinaroj por sia persista kaj progresema kulturkleriga laboro kun junularo.

JUNAJ ESPERANTISTOJ EL DONJI VAKUF EN BJELOVAR

La 18-an de majo la esperantistoj de Bjelovar bonvenigis en sia urbo la grupon de junaj esperantistoj el Donji Vakuf, kiun gvidis ilia instruisto k-do Imŝir. La grupo vizitis interalie la tombon de elstara antaŭmilita esperantisto kaj revoluciulo Tomo Vinkoviĉ kaj montaran domon sur monto Bilogora, haltiĝante en Veliko Trojstvo kie post la 1-a mondmilito restadis kaj laboris la prezidento de la Respubliko Josip Broz Tito.

(Laŭ »Juna Ambasadoro« n-ro 3/1974)

EN ITALA URBO CESENA 360 LERNANTOJ LERNAS ESPERANTON

En itala lernejo Oltresavio en Cesena 360 gelernantoj studas ĉi jare la Internacian Lingvon. La direktoro de la lernejo Sergio Mariani kompletigis jam la unuan serion de diapozitivoj por instruado de Esperanto en la lernejo. Oni planas uzi la serion por la instruado ankaŭ en aliaj italaj lernejoj.

(Laŭ »Juna Ambasadoro« n-ro 3/1974)



NOVA GEOGRAFIO KAJ NOVAJ TEMPO-MEZUROJ. De NIO. 32-paĝa + kovrilo kun 12-paĝa Suplemento. Sotto il Monte Giovanni XXIII (Bergamo) 1971 12,2 × 17 cm.

La aŭtoro prezentas kvar planojn: pri ŝanĝo de geografiaj mezuroj, tempomezuroj (horsistemo), kalendaro kaj geografiaj nomoj. Li proponas la 360 meridianojn ŝanĝi al 400 (nulo-meridiano pasus tra la mezo de Mediteraneo, lulio de multaj civilizoj) kaj la 90 paralelojn al 100, kaj tiel ricevitajn kvadratojn en pluajn cent. Ĉiuj geografiaj objektoj estu nomataj laŭ la koordinatoj. La tago estu dividita en 20 herojn, la horoj en 100 minutojn, kaj tiuj en 100 sekundojn (la horloĝojn oni devus adapti al la nova decimala sistemo). La jaro estu dividita en 52 semajnojn, sen monatoj.

La verkon inspiris homamo kaj sennacieca (supernacieca) sento. La aŭtoro faris grandan mensan streĉon por konstrui sian logikan sistemon. Kelkaj liaj proponoj estas avantaĝaj kaj praktikaj sendube (precipe en nuna epoko de aerveturado kiam fariĝas grava ankaŭ la geografio de la Tera atmosfero kaj kosmo!), sed pro la jam tradicia konservativeco de la homoj — nerealigeblaj. Ni memorigu nur pri la malsukceso kiun ĝisvivis la reformemuloj de la kalendaro. Do, restas nur noblaj revoj kaj bonhumora fantazio. La Homaro — skribas la aŭtoro — devos antaŭe unuiĝi, spirite kaj lingve, kaj en tiu unuece sankta etoso oni povos ekkomenci ankaŭ tiun ĉi grandiozan realigon. Belaj vortoj, sed ni demandas: ĉu entute iam tio okazos aŭ restos nur piaj deziroj?

M. Ĝivoje

JARLIBRO 1973 I k II parto. La jarlibroj de UEA estas ĉiam utilaj. La I parto (368 p.) havas nomaron kaj adresaron de la (fak) delegitoj en 66 landoj — unika servo de UEA al ĉiuj membroj. El la antaŭparolo ni ekscias, ke la membronombro estas 32 135, ke la aĉetado de E-libroj estis ekz. en 1971 kreskinta je 50% kompare kun 1970. La II parto (352 p.) enhavas interalie diversajn raportojn kaj liston de eldonajoj haveblaj ĉe la Libroservo de UEA.

Premia konkurso

de la revuo »HOMO kaj KOSMO«

La respondoj al la demandoj el Nr-ro 2/1974:

Demando: 1. Kiu giganta planedo dominos per sia senkonkurenca brilo en konstelacio de la Fiŝoj dum ĉi aŭtunaj vesperoj?

Respondo: planedo Jupitero

Demando: 2. Kian nomon havas la flugmaŝino, kiu antaŭ ne-longa tempo sukcesis el proksimo foti gigantan planedon Jupiteron?

Respondo: »Pioneer 10«.

Demando: 3. En kiu jaro eksplodis super Siberio (en regiono de rivero Tunguska) malgranda kometo?

Respondo: en la jaro 1908.

Demando: 4. Kian nomon havas la flugmaŝino, kiu antaŭ nelonge fotis el proksimo surfacon de planedo Merkuro?

Respondo: »Mariner 10«

Demando: 5. Kian nomon (esperantlingvan) havas du Marsaj satelitoj »Foboso« kaj »Deimoso«?

Respondo: »Timo« (Foboso) kaj »Teruro« (Deimoso).

REZULTO DE LA PREMIA KONKURSO

el la numero 1/1974

En la konkurso partoprenis 34 legantoj kaj al ĉiuj kvin demandoj ĝuste respondis 26 legantoj. La loto decidis pri la sekva ranglisto:

1. **Vytautas Šilas**, Litvio, 2. **Mladen Čuček**, Zagrebo, 3. **Stojan D. Minčev**, Bulgario, 4. **N. J. Zdrogov**, Sovetunio, 5. **D-ro Ivan Ilkov**, Bulgario.

NOVA PREMIA KONKURSO

Provu respondi al la sekvaj kvin demandoj:

1. Nun (aŭtune 1974.) estas bone videbla planedo, kies 4 plej grandajn satelitojn oni povas vidi eĉ per bona ĉasista binoklo. Kiu estas tiu planedo?

2. Kíom da lumjaroj estas granda nia Galaksio — la »Lakta Vojo«? (Sufiĉas respondi rondcifere).

3. Kioma estas temperaturo sur surfaco de nia Suno? (Sufiĉas respondi rondcifere).

4. Kian nomon havas sovetia kosmoŝipo, kiu antaŭ nelonga tempo alportis du kosmonaŭtojn al kosma stacio »Sojuz «3?

5. En kiu konstelacio troviĝas unu el la plej proksimaj galaksioj? (Tiu ĉi galaksio havas, cetere, ĉifron »M 31«).

La premioj por unuaj kvin solvontoj estos Esperanto-libroj laŭ propra elekto: »**Esperantonimoj**« (novaperinta libro de Marinko Gjivoje), »**Senĝenaj dialogoj**« de Alberto Fernandez, »**La paperoj**«, »**Tragedio en la Universo**« kaj novaperinta libro »**G. Marin vizitas sian hejmon — la mondon**«.

Se pluraj solvoj estos egalĝustaj, pri la ranglisto decidos, kiel kutime, la loto. La solvojn oni sendu al la adreso: Astronomia observatorio, 41103 Zagreb, Opatička 22, poŝtfako 38, Jugoslavio.

EL LA LETEROJ DE NIAJ LEGANTOJ

Nin ne afliku okazaj erarvojiĝoj

Kun intereso mi kaj ĉiuj klubanoj en nia uzina Esperanto-klubo legis viajn artikolojn pri Däniken. Multe da spaco vi dediĉis al ĝi kaj ni opinias, ke prave. Populariga revuo devas pritrakti vulgarigajn kvazaŭsciencaĵojn. Ne nur flati al la legantoj, sed ankaŭ eduki ilin.

Eble interesos vin kiel tipa mia rakonto pri evoluo de mia rilato al la »malkovroj« de Däniken. Laŭ rekomendo de miaj entuziasmigitaj amikoj mi tra legis la verkon. Mian kritikemon ne bridis eĉ mia konato, instruisto de historio. Feliĉe baldaŭ venis hazarde en miajn manojn kritika artikolo de iu faka gazeto kiu malkovris por mi la erarojn kaj mistifikaĵojn de Däniken en la parto de lia verko »Rememoroj pri Estonteco«. Kompreneble mi deduktis la saman nivelon de la ceteraj partoj de lia verko.

Mi esperas, ke viaj artikoloj influis multajn legantojn kiuj scias rezoni. La homo ĉiam ŝanceliĝas inter kredoj kaj nin ne afliktu okazaj erarvojiĝoj. Dolora estas nur dogma kaj fanatikeca apendiĝo al iu ideo kiu ne toleras kritikon kaj opozicion.

Karel Kraft (Příbran, Ĉeĥoslovakio)

Aŭguroj pri bona estonteco

Mi esperas, ke viaj aŭguroj pri bona estonteco de la revuo kaj pri funkcia kontakto kun la per(ig)antoj efektiviĝos. HkK meritas tion, ĝi estas bona gazeto.

Hugo Kraus (Vieno, Aŭstrio)

Pli da atento al la »H« el »HkK«

Kvankam la plej granda parto de HkK estis ĉiam dediĉita al la kosmaj eventoj, tio ne ĝenis min kiel maroficiron, kontraŭe. Tamen mi ĝojas ke nun la redakcio dediĉas pli da atento al la »H« el »HkK«. Parte tio certe rezultas el renoviĝo (varieco en manĝaĵoj ja manĝigas) de la revuo, sed verŝajne parte ankaŭ pro la reagoj al la von-Deniken-aĵoj. Ankaŭ la nova kovrilo tre plaĉas al mi, kvankam la antaŭa kovrilo ĉiam memorigis min al la tagoj feriintaj en Primošteno. Ankaŭ ĉi tie la redakcio bone sentis kiel sekvi la modon.

Inĝ. K. Ruig Nederlando

Diversaj nomoj por unuopaj konstelacioj

La enhavo de la revuo tre plaĉas al mi, precipe mi tre alte taksas la fakajn artikolojn priskribantajn la universon, la planedojn, la kosman esploradon. Iom malpli plaĉas al mi la tekstoj »filozofiemaj«, ekz. la artikoloj pri Däniken; estus pli bone skribi pri pli utilaj temoj.

La priesperantaj artikoloj kaj informoj estas ankaŭ bonaj, sed mi opinias, ke pri tio devus okupiĝi aliaj Esperantaj revuoj. Sed la E-aranĝoj, koncernantaj sciencajn temojn, povas esti pritraktaj en Homo kaj Kosmo, ekz. pri la geologia simpozio en Varsovio, pri la universitataj kursoj en Liege, pri la kunordiga konferenco en Maribor k. s. Tre bona ideo estas la rubriko Ni recenzas pro interesaj informoj pri diversaj jugoslaviaj bultenoj kaj ankaŭ sciencaj eldonaĵoj.

La lingvo de via revuo estas senriproĉa, ĝenis min iom nur la vorto »kuglo« (ekz. en La unua sekundo de universo), kiu devus esti »globo«. (Eble tio estas sub influo de germana lingvo; mi konas samideanon, kiu sub influo de la germana tre ofte »lañas« anstataŭ ridas.) Kaj jen mi havas unu lingvan demandon, koncernantan la nomojn de stelaroj.

Same kiel diversaj geografiaj objektoj ne havas unuecajn nomojn, ankaŭ en astronomio ekzistas diversaj nomoj por unuopaj konstelacioj, ekz. Akvario — Akvoverŝisto — Amforo, Ŝafo — Virŝafo, Ĉaristo — Koĉero, Serpentario — Ofiuŝo, Sagisto — Sagitario — Pafarkisto

ktp. Sed tio eble estas ankaŭ en naciaj lingvoj, ekz. en la ĉeĥa la Grandan Ursinon ni nomas ankaŭ Granda Veturilo. En la Poŝatlaso de la mondo, eldonita en 1971, oni uzas nomojn Hundido, Leonido, Ursido por konstelacioj, kiuj havas nomojn Malgranda Hundo, Malgranda Leono, Malgrada Urso. La nomoj kun sufikso -ido ŝajnas esti oportunaj kaj mallongaj, sed ekzistas unu problemo: ekzistas regulaj meteoraj svarmoj, kiuj aperas on iuj konstelacioj kaj laŭ la konstelacioj ili havas nomojn derivitajn ankaŭ per -ido: Liridoj, Kasiopeidoj, Perseidoj, Orionidoj ktp., kaj ankaŭ Leonidoj, Ursidoj. Kaj jen mi ŝatus scii vian opinion pri tiu ĉi problemo, ĉu estas pli bone uzi por la stelaroj la nomojn Hundido, Leonido, Ursido, aŭ prefere Malgranda Hundo ktp. kaj Hundidoj, Leonidoj ktp. lasi por la meteoraroj? Ĉu vi povus aperigi kompletan liston de la stelaroj en unu el la venontaj numeroj de via revuo?

Jiri Patera (Ĉeĥoslovakio)

RESPONDOJ AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Respondo al la supra demando de s-ano Jiri Patera postulas de ni ioman lingvan pristudon de la problemo; sekve ni klopodos respondi en sekvonta numero de nia revuo.

Inĝ K. Ruig, Amstelveen, Nederlando: enhavo de la libreto »La Profeto« de Kaŝilil Ĝibrano estas tre interesa sed aperigon de unuopaj ĉapitroj en HkK la redakta komitato konsideris neakceptebla.

LASTMOMENTE

»SALJUT 3« — NOVA ORBITA STACIO

La 25-an de junio estis lanĉita sovetia kosmostacio »Saljut 3« en ĉirkaŭteran orbiton. Ok tagojn poste estis lanĉita kosmoŝipo »Sojuz 14« kun du kosmonaŭtoj (Pavel Popoviĉ kaj Juriĵ Artjuhin). En la punkto de 4-a al 5-a julio la kosmonaŭtoj alproksimiĝis kun sia kosmoŝipo »Sojuz 14« al la stacio »Saljut 3« kaj la du kosmaj flugiloj laŭplane kuniĝis en kosma spaco. La kosmonaŭtoj tiam transiris el la ŝipo »Sojuz« en stacion »Saljut« por fari en ĝi sciencajn esplorojn.

Do, la sovetianoj havas ankaŭ sian »Ĉielan laboratorion« nur ĝi ne havas nomon »Skylab« kiel usona laboratorio, sed nomon »Saljut«. (Cetere, »Saljut« signifas en rusa lingvo »Saluto« kaj »Sojuz« signifas »Ligo«.)

Eva Walaszek varbis 106 abonantojn

Nepre laŭdinda kaj imitinda ekzemplo de varbado de novaj abonantoj estas tiu de nia pola perantino Eva Walaszek. Si venis al la ideo kunmeti trafan cirkuleran leteron kiun ŝi dissendis al ĉiuj filioj kaj rondoj de Pola Esperanto Asocio, al partoprenantoj de E-kursoj kaj individuaj esperantistoj. Kiel rezulto de tia kampanjo 106 esperantistoj sendis sian abonkotizon al ŝi. Nia fervora perantino estus kapabla varbi ankoraŭ pli da abonantoj sed ni devis determini kvanton de abonoj por Pollando pro neeblo utiligi la abonkvoton. E. Walaszek estas energetika teknikisto, laboranta en fervojista medio. Ŝi intencas partopreni la jubilean X Internacian E-Feriadon inter 5-18 de septembro en Miedzygórze kaj aranĝi tie ekspozicion de E-eldonaĵoj ligitaj al nia Observa-



torio kaj Primošteno. Kiu en pagipovaj landoj sekvos la ekzemplon de pola perantino?

Danaj abonantoj etentu!

Nia ĝisnuna dana peranto E. Starup (kun nova adreso: Kong Georgsvej 110 I, 2000 Kopenhago F) pro troa okupiteco transdonis la peradon de nia revuo al juna, energia s-ano S-ro Gunnar Kristensen Bethesdavej 5, 8200 ARHUS-N.

Vojaĝonte al Pollando, Ĉeĥoslovakio, Bulgario aŭ Sovetio turnu sin jam sufiĉe frue al redakcio de Homo kaj Kosmo por peti specialan cirkuleron kun utilaj informoj.

Jus aperis

NOVA TEATRO

9 monologoj de E.
Lapenna

56-paĝa poŝformata
belaspekta libreto

Prezo: 1. -dol., 2,50 gld.
aŭ 12. -din

Havebla ĉe la eldonisto:
Kroatia Esperanto Ligo,
41001 Zagreb, P. p. 703

KIAMANIERE ABONI

la revuon »HOMO kaj KOSMO«

La jarabono por la revuo »HOMO kaj KOSMO« estas **2 usonaj dolaroj (aŭ 6 ned. guldenoj ktp.** — ĉi tie nemenciitajn valutojn, kiuj estas tro multaj por povi ilin ĉiujn presi — ĉiu abonanto trovos sur la 4-a kovrilpaĝo; se ne mem elkalkulu). La abonon estas plej simple enpigi en via propra (nacia) mono.

La plej praktika maniero estas sendi la abonsumon en la nacia mono per la kutima poŝta enpagilo ĉe via loka poŝtejo. En tiu okazo sendu la monon NUR al sekva adreso: Zvezdarnica, 41103 Zagreb, Opatička 22, p. f. 38, Jugoslavio.

Se via loka poŝtejo, eble, ne volas akcepti la monon sendotan al Jugoslavio per simpla monenpagilo, tiam vi sendu monon pere de via loka banko. En tiu okazo sendu la monon simple al la ĉekkonto de nia revuo. La kompleta adreso de nia ĉekkonto estas: Zvezdarnica, Zagreb, 301-620-1001-3096-622 (Kreditna banka Zagreb), Jugoslavio.

Jugoslavaj abonantoj ne sendu la abonkotizon al tiu deviza ĉekkonto sed al la jena bankkonto: 30105-603-7379 de »Čovjek i svemir«, Zvezdarnica, Zagreb nepre indikate dorsflanke de la enpagilo: »jarabono por »Homo kaj Kosmo«.

La tria maniero por sendi la abonon estas — sendi ĝin al la peranto de la revuo »HOMO kaj KOSMO« en via lando (se en via lando jam estas la peranto de ni revuo). La listo de la landaj perantoj troviĝas sur la kovrilpaĝo de ĉi numero. (Se en via lando ne estas peranto, vi povas aboni la revuon pere de la perantoj en tiuj landoj, kie ili estas).


En Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Pollando, Rumanio kaj Sovetunio oni povas aboni »HOMO kaj KOSMO« **nur ĉe la landa peranto** de la revuo.

Sendante la abonon al la landa peranto — por ne tro ŝarĝi lin, per la superflua laboro — ni rekomendas al vi **samtempe skribi poŝtkarton al nia administracio** (la adreso: Astronomia observatorio, 41103 Zagreb, p. f. 38, Jugoslavio) kun la informo ke vi ĵus sendis la abonon al la landa peranto. Por ne tro laborŝarĝi la peranton vi sendu al li nur abonon, vian precizan adreson kaj la mencion, ke la sendaĵo estas abono por la revuo »HOMO kaj KOSMO«. Pri ĉio alia (informoj, demandoj, rimarkoj, klarigoj ktp.) komuniku rekte kun la administracio.

»HOMO kaj KOSMO« estas abonebla en ĉiuj landoj.

Casopis »HOMO kaj KOSMO« izlazi potporom Republičkog Savjeta za naučni rad SRH. Izdavač: Zvezdarnica, Zagreb, Opatička 22.
Odgovorni urednik: Marija Divjanović

Tisak: IBG — Tiskara »Zagreb«, Zagreb, Preradovićeve 21



Giganta telerforma anteno sur kampo Priličko apud Ivanjica lasas fortan impreson (legu la artikolon sur p. 7).

PERANTOJ

de la popularscienca revuo »Homo kaj Kosmo«

(en krampoj abonklotizo en valuto de koncernaj landoj)

Aŭstralio kaj Oceanio: Irene Fink, MOUNT WAVERLEY, P. O. Box 32,
Victoria, Australia

Aŭstrio: Hugo Kraus, Brigittenuer. Lände 150/5/3/12 WIEN XX
(40 ŝil.)

Belgio: Alberto Fernandez, Galglaan 20, GENT, pŝtĉk. 1010.24 (80 b. fr.)

Britio: Brita Esp. Asocio, 140 Holland Park Av. LONDON W. 11.

(0,90 pundoj)

Bulgario: Metodi Panĉev, str. Persenk, Blok 16, SOFIA — 7 (3 levoj)

Ĉeĥoslovakio:

Ĉeĥa Esperanto Asocio, Jilska 10, CS-110 00 PRAHA 1

(40 kronoj)

Danio: Gunnar Kristensen, Bethesdavej 5, 8200 ARHUS-N

(12 d. kr.)

Finnlando: Fondumo-säätiö ESPERANTO, SF-02220 IIRISLAHTI,

Esperantotie 4 (7 fmk.)

Franco: Unuiĝo Franca por Esperanto, 34 Rue Chabrol, PARIS 10

(9 fr.)

Germanio: Nora Caragea, 6 Frankfurt a/M 55 poŝtako 550153 (5 gm)

Germanio (DDR): Joh. Haupt, 4307 NEINSTEDT/Harz (6 markoj)

Grekujo: Kimon G. Eliopulos, 130 El. Venizelos, NEA SMIRNI

Hispanio: Hispana Esperanto-Instituto, BARCELONA, Apart. 2428

(130 pesetoj)

Hungario: Abonyi Arpád, VÁRPALOTA, p. f. 27 (45 ft)

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, I-20143 Milano

(1300 liroj)

Japanio: Rondo Konkorda (ĉe s-ano Komai) 12 Ŝogoin-nakamaĉi,

Sakjo-ku KIOTO 606 (600 jenoj)

Nederlando: Ru Bossong, Floraplein 23, EINDHOVEN (6 gld)

Norvegio: Odd Kolbrek, Kaldbakkstubben 22, OSLO 9 (12 n. kr.)

Polujo: Ewa Walaszek, 41-200 SOSNOWIEC, ul. Jagiellonska 1/47

(45 zlotoj)

Rumanio: Viktor Draghici, St. M. Basarab 27, BRAȘOV (20 leoj)

Sovetunio: Johannes Palu, Sólme 21, TALLINN 16, Estonio (2 rubloj)

Ivan Palkin, ul. Švernika 7, korp. 3, kv. 44, MOSKVA M-449

A. P. Hohlova, abon. jaŝĉ. 325, 252024 KIEV-24

R. Zakaŝankis, Abon. deĵe 10, VILNUS-C, Litovio

Usono: R. Kent Jones, N-ro 80, 3318 N. Lake Shore Dr., CHICAGO,

Illinois 60657, U. S. A. (2.- dol.)

La interlokaj perantoj, ricevintaj plurajn ekzemplerojn de ĉi tiu numero, estas petataj dissendi ilin al la samaj adresoj, al kiuj ili sendis la pasintan numeron.

KOMO kaj KOSMO

estas la unua populara naturscienca revuo regule aperanta en Esperanto kaj oficiale eldonata de la Astronomia observatorio.

Se la revuo »HOMO kaj KOSMO« plaĉas al vi, vi informu pri ĝia apero kaj pri la aboneblo viajn esperantistajn amikojn.

La revuo »HOMO kaj KOSMO« estas aparte konvena legaĵo por:

ĉiuj lernejoj kie estas instruata Esperanto

ĉiuj Esperanto-kursoj, societoj kaj seminarioj

ĉiuj junularaj grupoj